


Granda evento en muzika vivo de Peterburgo estis alveno de fama muzikisto Johan Ŝtraus. La 6-an de majo 1856 okazis lia debuto en Pavlovsk, kies koncertan halon oni nomis la unua rusa filharmonio.



La programo konsistis precipe el valsoj kaj polkoj. Kun aparta entuziasmo estis akceptita valso "Balo de juristoj", kiu estis ripetita trifoje. Tre plaĉis al la publiko per sia gracia, vere danca melodieco polko "San-Susi". La koncerto finiĝis neordinare. Adorantoj de viena majstro prenis lin en la manojn kaj akompanataj de admiranta amaso, portis lin ĝis la loĝejo. Dum unu vespero Ŝtraus iĝis idolo de pavlovskaj aŭskultantoj kaj aparte aŭskultantinoj.



Koncertoj en Pavlovsk daŭris dum tuta somero kaj aŭtuno. En programojn de la koncertoj Ŝtraus metis komponaĵojn de Mocart, Beethoven, Veber, Ŝubert, Mendelson, Berlioz, Wagner.



Ŝtraus tre interesiĝis pri la rusa muziko. En siaj polkoj, mazurkoj kaj kadriloj, komponitaj en Rusio, li uzis popolajn melodiojn kaj ankaŭ tiujn de Varlamov, Guriljov, Alabjev. Kun granda atento rilatis Ŝtraus al kreado de Glinka, plenumante en koncertoj liajn pororkestrajn komponaĵojn kaj fragmentojn el operoj.

Malfacile travivinte dum la infaneco la disiĝon de la gepatroj, Ŝtraus arde deziris renkonton kun ideala virino, kun kiu lin ligus profunda kaj eterna sento. Kaj iun tagon la revo iĝis realo. Somere 1858 dum unu el promenoj oni lin konatigis kun junulino Olga. Ŝi allogis lin ekde la unua renkonto.



Olga estis talenta pianistino. Krome ŝi estis ankaŭ komponistino, aŭtoro de romanoj, multaj el kiuj estis publikigitaj.

Olga kaj Johan arde ekamis unu la alian. Sed estis klare, ke la geedziĝo ne eblas, ĉar Olga, filino de generalo Smirnikij, ne ricevos konsenton por ilia geedziĝo. Kapelmajstro, eĉ la plej talenta kaj plej sukcesa, ne taŭgas kiel edzo de generala filino.

Antaŭ la forveturo Ŝtraus kaj Olga renkontiĝis. Ili eksidis ĉe la piano. Por iel gajigi la amikinojn Johan ludis pianan varianton de ŝia romano "Disŝiriĝas animo" (laŭ teksto de I. Kolcov).

Olga kantas por Ŝtraus sian romancon "Se la vivo trompos vin". Antaŭ la fermo de la sezono Ŝtraus aranĝis por orkestro kelkajn romanojn de Olga kaj plenumis ilin en Pavlovsk stacidomo la 24-an de septembro 1858.

Somere 1859 Ŝtraus dediĉis al sia amatino ĉarmajn polkojn-mazurkojn "Fripineto" kaj "Koboldo".

La jaroj 1861 – 62 estis por Ŝtraus la jaroj de seriozaj ŝanĝoj. En lia metodo de ludo malaperas superflua ekspansieco, ĝi iĝas pli rigora, pli academia. Disiĝo kun Olga lasis en animo de Johano subpremanta senton de malpleno. Aŭtune 1861 li eksciis pri la fianĉiĝo de Olga.

Vintre de la sama jaro li konatiĝis kun Genrietta Greĉ kaj decidis edziĝi al ŝi.



Ŝi estis interesa virino, brila kantistino, lasinta scenejon antaŭ kelkaj jaroj. Genrietta estis pli aĝa ol Johan je sep jaroj, travivis ŝtorman vivon, havis kelkajn bastardojn.

Somere 1862 Johan denove estis en Pavlovsk. Li venis kune kun frato Jozef. Li prezentis al la publiko sian fraton. Reveninte en Vienon en aŭgusto, Johan edziĝas al Genrietta Greĉ. Ekde nun li venadas al Pavlovsk kune kun la edzino.



2003 en la parko de Pavlovsk estis inaŭgurita la monumento al granda aŭstria komponisto. Ĝi estis donaco de Aŭstrio al Peterburgo okaze de la 300-jara urba jubileo. La skulptaĵo estas ĝusta kopio de la Ŝtraus-monumento en Vieno (skulptisto Edmund Helmer, 1907).



Muziko de Joĥan Ŝtraus sonas en Pavlovsk ĉiujare dum festival "Granda valso" kiel antaŭe en Rosa pavilono.

**Aŭtoroj: Bronislav Ĉupin (Iŝevsk)
Margarita Karceva (Uljanovsk)**



JOĤAN ŜTRAUS en Pavlovsk

